



MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

INFORMILO 1

JANUARO 2025 Kol. 474/41

XX

Enhavo: Poemo Januaro, Petr Angelov, Montevideo,
Mesaĝo de UEA, Antaŭtuko, Tristaj anoncoj

XX

Januaro

Sur vojoj neĝkovritaj kaj ŝoseoj
la gent' de forlasitoj vagas.
Malsekaj vintroj per ĉizilo de doloro
gravuris monogramon de mizero en
iliajn korpojn,
kaj tiel ili vagas tra la mondo.
La lum' de leviĝanta stelo ne por ili
brilas. Ilia Betlehem' forbrulis.
Nur en vag-rondoj ili dian teron tretas
kaj sur ilia infanec-obstina vang'
fluetas en gutoj prujno.
Gastejon varman por vesper' al ili donu, Dio, kaj plenan pladon kaj
bonan homan vorton.



Ni trovis la tekstojn de **Karel Toman - Monatoj**, kiujn en
Esperanton tradukis Jaroslav Mráz. Ni planas publikigi ĉi tiujn
tekstojn ĉiumonate ĉi-jare, kun bildoj de nia amikino Zuzana
Pospíšilová.

Karaj geamikoj, estimataj legantoj,

la jaro 2024 forkuris kaj ni staras ĉe la komenco de plua jaro kaj ni cerbumas, kia ĝi estos.

Atendas nin la ĉefa evento de la jaro - Universala kongreso de Esperanto, kiu okazos de la 26-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto 2025 en nia lando, en Brno. Ni esperas, ke ĉiu, kiu povas helpi al la organizantoj, proponos sian helpon kaj partoprenos la UK.

Por ke nia asocio povu funkcii, jam dum la 7-a kongreso de AEH en Hodonín ĉe Kunštát en la jaro 2017 ni konsentis pri membraj kotizoj (abonoj por Informilo). Bonvolu ne forgesi sendi la abondon 300,- Kč (20 euroj) por papera formo de Informilo kaj 150,- Kč (10 euroj) por sendi la gazeton elektronike. La kontribuo por nia AEH estas libervola. Ja de tiu tempo la kosto de afranko altiĝis, tamen ni la abondon ne altigis, danke al donacoj de tiuj, kiuj povas kaj volas helpi al ni. Ni dankas al tiuj, kiuj jam sendis al ni monon, kiel abono por tiu ĉi jaro.

Do, ni ĝojatendas vian partoprenon, subtenon kaj viajn kontribuojn por pluaj Informiloj.

Mi deziras al vi ĉiuj firman sanon, multe da optimismo kaj kontenton.

Petr Angelov, prezidanto de AEH

Montevideo en la memoro

La 10-an de decembro 2024 en Montevideo okazis internacia konferenco pro la 70-a datreveno de la rezolucio de Unesko pri Esperanto, akceptita antaŭ 70 jaroj en la ĉefurbo de Urugvajo. Oni povis partopreni la konferencon surloke aŭ rete. Vi povas legi pli en *La Ondo de Esperanto*

Post multaj diskutoj kaj kompromisoj, la Rezolucio estis finfine akceptita de la plenkunsido de la ĝenerala konferenco la 10an de decembro 1954, sed kun malpli radikala teksto, kiu ne enhavis



la rekomendon al la ŝtatoj-membroj. Tamen, la Rezolucio estis granda venko por la Esperanto-movado, kiu tiamaniere akiris oficialan kaj konsultan statuson ĉe Unesko.

Ekde tiam, la rilatoj inter UEA kaj Unesko daŭre evoluis, kaj plurfoje ankaŭ Unesko montris intereson kaj aprezon pri Esperanto kaj ĝiaj kulturaj kaj edukaj kontribuoj. La plej grava ekzemplo estis la vizito de la ĝenerala direktoro de Unesko, Amadou-Makhtar M'Bow, al la Universala Kongreso de Esperanto en Rejkjaviko en 1977. En 1985 Unesko akceptis duan rezolucion pri Esperanto okaze de la centjara jubileo de la lingvo, kiu plifortigis la antaŭan agnoskon kaj rekomendis al la membro-ŝtatoj enkonduki stud-programojn pri lingvaj problemoj kaj pri Esperanto en la lernejoj kaj universitatoj.

En ĉi tiu nova datreveno de la Rezolucio de Montevideo, ni profitas la okazon por rememori la historion kaj signifon de tiu dokumento, kiu reprezentas la komunajn celojn kaj idealojn de Unesko kaj Esperanto: konstrui pacon en la mondo per kulturo, edukado kaj scienco. Kaj ankaŭ por reliefigi la 70 jarojn da kunlaborado por lingvaj homaj rajtoj inter Unesko kaj la organizita komunumo de parolantoj kaj subtenantoj de la internacia lingvo Esperanto.

Tiucele, sub la aŭspicioj de UEA, TEJO, ILEI kaj la Urugvaja Esperanto-Societo, stariĝis komisiono konsistanta el lokaj

esperantistoj kaj reprezentantoj de diversaj institucioj kaj Esperanto-asocioj de la amerika kontinento. Tiu ĉi komisiono laboras nuntempe por la organizado de internacia konferenco por memorfesti tiun signifoplenan mejloŝtonon en la historio de la lingvo Esperanto. Vi povas legi informojn pri ĝi en <https://eventaservo.org/e/cd3f97>.

Mesaĝo de UEA okaze de la Internacia tago de homaj rajtoj, la 10-an de decembro 2024

Kiam la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj estis proklamita en la jaro 1948, ĝi konsistigis promesplenan mesaĝon al mondo disvundita de terura monda milito. Universala Esperanto-Asocio deklaris tiujn principojn fundamentaj al la laboro de la Asocio.

Hodiaŭ, la principoj de la Universala Deklaracio restas tro ofte malobservataj, tiel ke tutaj popoloj suferas militon, malriĉon, malsanecon kaj senhejmecon, milionoj da rifuĝintoj apenaŭ eltenas sian situacion, kaj konfliktoj kaj militoj multiĝas, kune kun malobservoj de bazaj homaj rajtoj. En nia asocio, la Deklaracio de Homaj Rajtoj do fundamentas nian agadon. Ni aparte interesiĝas pri internacia komunikado, pri la rajto esprimi sin kaj esti aŭdata en spirito maksimume egaleca kaj inkluziva. Pro tio, ni pristudas kaj antaŭenigas lingvajn homajn rajtojn, kaj la vojon de interkompreniĝo inter malsamaj popoloj. Ĉiujare nia Asocio observas la Tagon de Homaj Rajtoj, la 10-an de decembro, kune kun alia grava dato: la 15-a de decembro, kiam naskiĝis L. L. Zamenhof (1859-1917), la iniciatinto de Esperanto. Ĉi-jare ni festas ankaŭ la 70-an datrevenon de la Rezolucio de la Ĝenerala Konferenco de Unesko, akceptita en

Montevideo la 10-an de decembro 1954, kiu rekonis "la rezultojn atingitajn per Esperanto sur la kampo de la internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj de la mondo." Tiu rezolucio lanĉis jam sepdek jarojn da kunlaboro inter Unesko kaj UEA.

Okaze de la Internacia Tago de Homaj Rajtoj 2024, ni renovigas nian promeson antaŭenigi la homajn rajtojn, agadi por minimumigi kaj forigi lingvajn obstaklojn en internaciaj rilatoj, kaj disvolvi komprenon kaj estimon inter la diversaj popoloj de la mondo. Sen interkompreniĝo ne eblas eviti militojn, ne eblas solvi la problemojn de la hodiaŭa mondo, kaj ne eblas krei la kondiĉojn por daŭripova mondo en estonteco.

El la Gazetaraj Komunikoj de UEA

Antaŭtuko (tre bela parolado)

Mi pensas, ke multaj infanoj nuntempe eĉ ne scias, kio estas antaŭtuko.

La ĉefa celo de la antaŭtuko de avino estis protekti ŝian robon, ĉar ŝi havis nur kelkajn. Ankaŭ antaŭtukojn estis pli facile lavi ol lavi vestaĵojn kaj antaŭtukoj bezonis malpli da materialo. Sed krom tio, ĝi servis kiel manprotekto por preni varmajn patojn el la forno. Tiuj grandaj malnovaj antaŭtukoj viŝis multajn ŝvitajn fruntojn klinitajn super varma forno dum kuirado kaj bakado. Ĝi estis ankaŭ bonega por sekigi larmojn de infanoj kaj ankaŭ ofte estis uzata por purigi malpurajn orelojn. Kiam venis vizitantoj, ĉi tiuj antaŭtukoj estis idealaj kaŝejoj por timemaj infanoj. Kiam alvenis neatendita vizitanto, estis mirinde kiom da mebloj ĉi tiu antaŭtuko povis senpolvigi en sekundoj. En la antaŭtuko virino kutimis porti ovojn same kiel kokidojn

kaj anasidojn. Ĉiaj legomoj estis alportitaj el la ĝardeno. Ankaŭ dividitaj pizoj. Aŭtune oni uzis la antaŭtukon por kolekti pomojn, kiuj falis de la arboj. Segopolvo kaj ŝtipoj estis portitaj en tiu antaŭtuko al la kuirejo.

Kiam la vespermanĝo estis finita, avino eliris sur la verandon,



svingis sian antaŭtukon, kaj la viroj sciis, ke estas tempo reveni de la kampoj por vespermanĝi. Avino kutimis meti siajn varmajn bakitajn tortojn sur


Desegnaĵo de Edvard Brož 7-jara

la fenestrobreton por malvarmigi. Ŝiaj nepinoj metis la sian sur la fenestrobreton por degeli. Ili verŝajne freneziĝus nun, se ili ekscius kiom da kontaĝaj ĝermoj estas sur tiu antaŭtuko.

Kaj kiam estis malvarme, avino ĉirkaŭvolvis sian antaŭtukon. Pasos longa tempo antaŭ ol iu elpensos ion por anstataŭigi la "malnovmodan antaŭtukon", kiu servis por tiom da celoj. Sed mi pensas, ke mi neniam kaptis ion alian el la antaŭtuko, nur amon

Aŭtoro nekonata. El la interreto tradukis L.S.

Tristaj anoncoj:



La 4-an de decembro 2024 forpasis multjara ano de EK Pardubice kaj ankaŭ de AEH, nia kara amiko **Pavel Nechvíle** (82-jara) el Pardubice. Li laboris kiel sekretario de EK Pardubice kaj en la jaro 2007 li estis elektita kiel prezidanto de AEH. En la jaro 2009 li kun Jarmila Rýznarová parolis en Ĉeĥa Radio (Český rozhlas), li esperantigis la retejon "Sankta Jan sub la Roko" (Svatý Jan pod Skalou) kaj kun Josef Hron ili verkis broŝuron Cent jaroj de Esperanto en Pardubice. Li ankaŭ plejparte kunlaboris en la jaro 2020 pri la traduko kaj eldono de la nova broŝuro pri nia urbo Pardubice.

De Liba Gabalda ni ricevis tristan sciigon, ke la 4-an de decembro 2024 forpasis ŝia 78-jara edzo Floreal. Ni legadis interesajn artikolojn pri diversaj E-renkontiĝoj tra la mondo, kiujn ili partoprenadis. Ni sentas grandan perdon kaj elkore ni kondolencas al la familio.

Floreal Gabalda naskiĝis en Francio en 1946 al hispanaj gepatroj. Post la bakalaŭriĝo en 1965 li studis en Universitato de Grenoblo kaj en la jaro 1971 ricevis titolon Doktoro-Inĝeniero.



Li estis tre modesta. Poste, anstataŭ la militservo, li preferis labori kiel kooperanto kaj profesoro en Venezuela Universitato de Teknologio (IUT) en Karakaso, kie li restis kvin jarojn. Esperanton li ellernis samtempe kun sia patro fine de la jaro 1963. Li tuj komencis serioze aktivi en Venezuela

Esperanto-Asocio, en junulara movado kaj en SAT. Li estis honora membro de TEJO. Kun sia edzino li konatiĝis en la jaro 1968 dum la 63-a Universala Kongreso en Varna (Bulgario). Post la geedziĝo en Ĉeĥoslovakio ili reiris Venezuelon en la jaro 1980, kie li daŭrigis sian profesian postenon de profesoro. Kune ili aktivis en VEA. Floreal fariĝis la vicprezidanto, Liba kasistino kaj ŝi iniciatis la E-kronikon. Ili ambaŭ ankaŭ instruis Esperanton. En Karakaso naskiĝis iliaj du infanoj Belonia kaj Ideal, ambaŭ denaskaj esperantistoj. Post la malfavora situacio en Venezuelo ili revenis Francien en la jaro 1986. Ili partoprenis multajn E-kongresojn, seminariojn kaj aliajn E-aranĝojn: UK, IK SAT, IFEF, ILEI, MES, PSI, BET, jarfinajn renkontiĝojn en Germanio: IF, NR, Luminesk, seminariojn en Kvinpetalo, kastelo Greziljono, Metabief, Internaciajn E-Semajnojn en Hispanio kaj plurajn aranĝojn en Ĉeĥio. Ili ŝatis vojaĝi, viziti multajn landojn kaj ĝui esperantan etoson. Floreal tre mankos al ni.

Liba Gabalda

Honoron al ilia memoro.

INFORMILO – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento ANTAŬEN

Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj en Pardubice

Redaktoroj: Mirka Kosnarová, Ludmila Srbová

Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,

530 03 PARDUBICE, CZ tel. +420 721 537 970

e-mail: aeH@esperanto-aeH.eu interreto: www.esperanto-aeH.eu

Banka kunligo: Fiobanko, kont-numero de AEH 2801322017, bank-kodo 2010

Bankovní spojení: Fio banka, číslo účtu AEH 2801322017, kód banky 2010

IBAN: CZ3520100000002801322017 **SWIFT/BIC:** FIOBCZPPXXX

La jarabono de Informilo **20 €** (en kovertoj), aŭ **10 €** (e-mail)

Roční předplatné Informila **300,-Kč** (v obálkách), nebo 150,-Kč (v e-mailu)

Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (naleznete nad vaší adresou) jako variabilní symbol! Příspěvek svazu AEH v dobrovolné výši.

Kotizo por AEH propravola. Kodo ĉe UEA: aehk-z

La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.